

Ora Ĵurnalo

Numero 36, Januaro 2021



La trimastulo Viking, vidita de la Gotenburga opero.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo


Enhavo	2	Aforismo de Dag Hammarskjöld	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Medito pri tipa brito.....	19
Espeporko meditas.....	3	Kio estas tipe por la svedoj?.....	19
Var inte rädd för mörkret/Mallumon ni ne timu	4	Al mia fratino.....	20
Vintra Espero	5	La svedoj de la 2021 – kiaj ili estas?.....	20
Poemoj de Lenke Szász	6	Siv Widerberg 1931–2020	21
Al mia nekonata avo	6	El gazeto de Hennebont, Bretonio	22
Teranoj	7	La baroka epoko	23
El Homa Vivo de Honoré Sebuhoro	7	La baroka galerio	24
La homa kritiko.....	8	Se vi volus sperti nekutime pensantan konatulon – elektu Gry Jannicke Jarlum.....	26
Esprimo de arbo	8	Kristina Lugn	26
Träd/Arboj	8	Iomete pri Adrienne Pásztor, Hungario.....	27
Tabelo de svedaj arboj.....	9	El la biblioteko en Stannum – Volapük	28
Denove: La balado pri la blua vaska ĉap’.....	10	La Volapük-himno de Franz Zorell en Esperanta traduko	29
Multo estas dirita pri Esperanto.....	11	Gekuzoj renkontiĝas en Gotenburgo	29
Korea alfabeto	13	Pri vikingoj en Nordio.....	32
La gramatiko de lingvo sen gramatiko.....	14	Arne la ĉefido (parto).....	32
Ingas språkspalt i januari	14	El islanda Edda.....	33
Por ni nova gazeto, nomita Nova Urbo	16	Vintra bildo de mia kuireja fenestro	34

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68. Monapogoj tre bonvenaj al sveda pĝ 436 12–1.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arensian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas



Sanan Novan Jaron!

- ☆ La koboldoj estas for. La kristnaska arbo estas forĵetita, la mallumo ne plu estas tiel densa – komenciĝas Nova Jaro kun Novaj Pensoj kaj Novaj Ambicioj. Sur la bildo estas la renversita plej suba parto de pureo – kiel ebla simbolo de sana vivo.
- ☆ La limo de partoprenontoj en la libro-rondo pri "Sesdek ok" estas jam pasita. La unua reta renkontiĝo okazos en 31 januaro.
- ☆ Kiel dum ĉiu januaro, vi denove devas pagi por diversaj membrecoj kaj diversaj gazetoj. Por Ora Ĵurnalo vi pagas nenion, sed se vi volus doni ion por nia nova komputilo kaj printilo en la biblioteko de Stannum, mi ne protestus. Nun eblas por Gotenburganoj veni al la biblioteko en Stannum por legi siajn mejlojn kaj eble verki interesan artikolon por Ora Ĵurnalo.
- ☆ Ĉu vi eble rimarkis, ke troviĝas en nia retpaĝo tabelo pri la prunteblaj libroj. En tiu listo nek troviĝas la plej novaj libroj nek libroj en aliaj lingvoj ol esperanto (ekz. Ido, Volapük, Mondial, Interlingwe k.a.) Pezaj libroj kiel PIV kompreneble ankaŭ ne troviĝas sur la listo.
- ☆ Ĝuinda afero estas ke la biblioteko de Lerum volonte ricevis de Eldona la jenajn librojn: *Flugoranĝo rakontas, Aniaro,*

Söka bostad i storstaden, Malvarma bufedo, Orm la ruĝa (ankaŭ la dua volumo), *Kroze-proze* kaj *La knabo kiu vivis kun strutoj*. Bv. prunti por montri ke bonas havi esperantan literaturon en la publikaj bibliotekoj!

- ☆ Mi tute malŝatas la admonon eviti verki poemojn jam post la komencanta kurso. Ŝajnas ja aparta emo inter esperanto-studentoj poemi. La kursanoj pri la franca aŭ germana malofte havas tian ideon. Sed pri esperantistoj estas alie. Se vi kuraĝigas ilin, eble kelkaj iam estos veraj verkistoj. Tamen eĉ tre talentaj verkistoj ofte ne estas kontentaj pri siaj poemoj. Pli malfacile ol la prozo. Se vi volus plibonigi tekston publikigita en Ora Ĵurnalo – bonvenon! Gunnar Olsson plibonigis kanton. La tutan vivon ni ja strebas pliboniĝi.
- ☆ En la decembra numero ni skribis iomete pri IKEA. En ĉi tiu numero estas la malo – la baroka stilo. Kontrastoj vigligas!
- ☆ La kono pri kutimoj kaj kulturoj el diversaj landoj ja riĉigas nin. Adri Pásztor el Hungario nun kolektas rakontojn el multaj landoj. Eble vi havas ideon pri rakonto, tipa por Svedio?

Fartu bone! /Siv



Var inte rädd för mörkret

av Erik Blomberg 1920

Var inte rädd för mörkret,
ty ljuset vilar där.
Vi ser ju inte stjärnor,
där inget mörker är.

I ljusa irisringen
du bär en mörk pupill.
Ty mörkt är allt som ljuset
med bävan längtar till.

Var inte rädd för mörkret,
ty ljuset vilar där.
Var inte rädd för mörkret,
som ljusets hjärta bär.

Mallumon ni ne timu

**tradukita de Sten
Johansson**

Mallumon ni ne timu,
ĉar nestas en ĝi lum'.
La steloj ja ne glimas
se mankas la mallum'.

En helo de l' iriso
ja nigras la pupil'.
Ĉar nur en la mallumo
eklumas la sopir'.

Mallumon ni ne timu,
ĉar nestas en ĝi lum'.
Mallumon ni ne timu,
pro ĝia kor-brakum'.

<https://www.youtube.com/watch?v=ncwfUviOiW0>

Vintra Espero

de Ingegerd Granat



Laŭ la vojo,
sub la suno.
Pensante mi iras.
"Printempo mi amas vin!"

Floroj kreskas ĉe
rando de fosaĵo.
En miaj pensoj,
mi kolektas florojn!

Mi atendas la varmon
la helan, longan nokton.
Trinku la vivan akvon,
ĝuu la floran vivon!

Ranunkolojn kaj kornlotusojn,
pli flavas en mia bukedo.
Mi sentas min feliĉa.
Mi amas la flavan koloron!

Nur en printempo
la flora espero kreskas.
Baldaŭ ekos somero.
Mi tre sopiras.

Poemoj de Lenke Szász

La rumana verkistino gajnis premiojn pro siaj poemoj. Ekz: de EKRA, Belartaj Konkursoj, Hristo Gorov kaj ŝiaj poemoj aperis en Heroldo, Literatura Foiro kaj en Vizaĝoj de Sten Johansson.

Ŝi mem eldonas la librojn. Se vi volas aĉeti **"Poemoj"** de 2018 ni donos al vi ŝian retadreson.

Ekz. pri aliaj titoloj de poemoj, kiujn mi aparte ŝatas pro la rakontetoj, ofte dolĉe melankoliaj:

Malnova parfumujo, Vizitkarto, Domoj sen loĝantoj, Eta skarabo.

Bona donaco al geamikoj! /Siv



Al mia nekonata avo

Forrabis vin kruela mondmilito
La sort' ne lasis morti vin en lito,
Legenda muelisto, mia avo,
Pereis malproksime en batalo.

Ie, sub bataalkampo herbkovrita,
Kuŝas vi nun, de ĉiuj forgesita.
Mi serĉis, sed ne trovis vian spuron,
Ne eblas trapenetri la Mallumon.

Kio instigis min al la serĉado?
Ĉu venas de ie voko de l' avo?
Ĉu el spirita mondo li alvokas
Kaj al nepino mesaĝon transdonas?

Kio do povus esti la mesaĝo?
En la milito de l' falinta avo?
El lia tombo voĉo al mi sonas:
Nenio, ol la paco pli valoras.

Teranoj

Sur glata vojo glitas silente nokta buso
Mi sidas duondorma kaj laca en mallumo.
Vojrande herboj, arboj kliniĝas pro la vento,
En mian kapon venas subite stranga penso.

Mi pensas, ke la arboj kaj herboj eble sentas
Same kiel la homoj, teranoj ili estas.
Kun ili ni dividas nian surteran vivon,
Kaj sentas ankaŭ ili solecon kaj la timon.

Ĉu sentas vi, ho arboj, konscias pri la morto,
Pri kio nin atendas, nia komuna sorto?
La vento sub la pala luno vin klinigadas,
Velkintaj, sen foliaj, senvorte vi staradas.

Iras la nokta buso, dormas la pasaĝeroj –
Spirito de la nokto ŝvebas super la tero.
Ne timu kaj ne plendu, ne estas vi solulo,
Vi estas, kiel arbo, parteto de l' Naturo.

Lenke Szász

El Homa Vivo de Honoré Sebuhero



Mi nomiĝas Honoré Sebuhero. Mi naskiĝis en 1974, kaj mi loĝas en Ugando. Mi estas edziĝinta kaj havas 5 geinfanojn. Miaj gepatroj priokupiĝas pri la agrikulturo. Mi bedaŭras, ke unu el miaj gepatroj jam forpasis. Mia patrino estis atakita per serioza malsano kiu daŭris ses monatojn.

Mia edzino nomiĝas Anita, naskita en 1984, ŝi priokupiĝas pri tranĉanta kudrado. Hodiaŭ la familio malrapide iĝas Esperantista.

Persone mi ne havas laboron, nur ke mi priokupiĝas al la infanoj de Instituto Betanio/NJILI en la loko Remera pri Esperanta kurso ekde 2012 ĝis hodiaŭ.

Estis serioza batalo konvinki iujn lokajn intelektulojn pri la kurso de la internacia lingvo Esperanto. Ili diris tiele: Kio estas Esperanto? Kie oni parolas

Esperanton? Kiu estas la estonteco de ĉi tiu lingvo? Finfine, tiuj intelektuloj estas konvinkitaj kaj komprenis ke Esperanto estas

vigla kaj praktika lingvo en diversaj landoj ĉirkaŭ la mondo.

Honoré sendis la jenan poemon:

La homa kritiko

Vi malsukcesas, oni kritikis vin.

Vi sukcesas, oni kritikis vin.

Vi estas societema, vi estas kritikata.

Vi estas introvertita, kritikata.

Vi malĝojas, oni kritikis vin.

Vi estas feliĉa, oni kritikis vin.

Vi estas dika, oni kritikis vin.

Vi estas maldika, oni kritikis vin.

Vi estas en rilato, oni kritikis vin.

Vi estas fraŭlo, oni kritikis vin ...

Fakte, kion ajn vi faras, vi estas kritikata ...

Kaj tiam la tagon, kiam vi mortas, homoj diras: "Li estis bona homo"!

**Moralo: en la vivo, kion ajn vi faras, vi estas kritikata ... do faru ĝin ĉiuokaze!
Ĉesu zorgi, ĉesu aŭskulti aliajn, kaj faru tion, kion via intuo kaj via koro diras al vi fari ...**

... kaj fine fariĝas la persono, kiun vi meritas fariĝi!

Liberigu vin de viaj ĉenoj

Kore, Honoré Sebuĥoro el Norda Kivu / DR Kongo (honsebn@gmail.com)

Esprimo de arbo



img bruno teste

Bildo de Светлана Коняшова. Humuro en Esperanto (en arto, literaturo kaj vivo).

Naturskyddsföreningen (Natur-protektada organizo) diras i.a.:

"Nuntempe oni ne senbarigas grandajn areojn kiel antaŭe, sed kiam U.N. rankas la landojn laŭ la grandeco de la arbara areo estante protektita, Svedio troviĝas sur la 99a loko.

Fakte tio viciĝas post landoj, kiuj ofte estas kritikitaj pro senarbarado, ekz. Brazilo (sur la 33a loko) kaj Malajzio (sur la 73a loko). Nur 5 % ĉe ni estas protektataj arbo-areoj."

Pli sube vi trovas tabelon, kiu montras ke la piceo dominas je 40,8 %. Malbone por la specoriĉeco de bestoj kaj plantoj.

Träd

Ett land utan träd och sly
hur skulle det se ut
när våren kommer fräsch och ny
och inga blad slår ut!
Gifter får vi fler och fler
försurningen är svår.
men mycket syre träden ger
som renar luften vår.
Vad skulle barnen klättra i
om träden inte fanns
var skulle fåglar sätta bo
om träd fanns ingenstans?

Arboj

Landon sen arbar' mi ne volus!
kiel aspektus naturo
se verdaj arboj ne rolus
grandan rolon por aera puro?
Venenoj venas pli kaj pli
ankaŭ acidiĝo de la grundo
sed oksigenon donas al ni
arboj, kun verdaj foli-inundo.
Kie infanoj grimpus
se arboj nenie troviĝus
kaj kie la birdoj kovus
la idojn naskitajn ĉi tie?

/Siv



Tabelo de svedaj arboj

Laŭ rango	Speco svede	Speco Esperante	Procento
1	Gran	Piceo	40,8
2	Tall	Pino	39,0
3	Björk	Betulo	12,4
4	Asp	Tremolo	1,6
5	Al	Alno	1,6
6	Ek	Kverko	1,3
7	Contorta-tall	Kontorto-pino	1,3
8	Bok	Fago	0,7
9	Sälg	Saliko	0,5
10	Rönn	Sorpujo	0,2
11	Ask	Frakseno	0,2
12	Lönn	Acero	0,1
13	Alm	Ulmo	0,1
14	Lärkträd	Lariko	0,1
15	Lind	Tilio	< 0,1
16	Fågelbär	Merizo	< 0,1
17	Avenbok	Kapeno	< 0,1
	Övriga lövträd	Restantaj foliarboj	0,1
			100,0

Denove: La balado pri la blua vaska ĉap'

Nova traduko de Gunnar Olsson.

Li trovis ke mia traduko ne estis sufiĉe kantebla (en la novembra numero). Jes ĉi tiu traduko vere estas pli bona. Ĉu vi ŝatus fari la trian version – vi estas bonvena.



/Siv

Krig och död, ett fjärran land
gråt och svält, ett land i brand.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Han kom dit från ett land i nord
att få slut på krig och blod.
Reste hit från sin fästemö
reste hit för att kanske dö.

Han kom dit för att skapa fred
skapa fred i ett land som led.
Som en vän var han alltid sedd
och var för ung för att vara rädd.

Läppar dog, som kvinnor kysst
blod och eld, se'n blev han tyst.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Så en dag kom det ett brev
och i det hans fästmö skrev.
"Vad som än sker, så finns jag här
och du vet att jag har dig kär.

Krig och död, ett fjärran land
gråt och svält, ett land i brand.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Milit' kaj mort' en fora land,
malsat' kaj plor' sur fajra kamp'.
Sed en la lumo de la mangrenad'
en blua ĉap' staris svedsoldat'.

De hejm' en nord' li venis por
militon fini – ĉasi for.
Forlasis li sian fianĉin'
por ebla sort' de morta fin'.


Krei pacon estis lia cel'
en land' plenita de kverel'.
Kiel amik' oni taksis lin
tro juna por senti la tim'.

Lipoj kisitaj de virin'
sang' kaj fajr' – kaj vivofin'.
Sed en la lumo de la mangrenad'
en blua ĉap' staris svedsoldat'.

Subite venis la mesaĝ'
fianĉino skribis sur la paĝ':
Mi atendas vin, nur kredu min
kaj sciu vi: Mi amas vin.

Milit' kaj mort' en fora land,
malsat' kaj plor' sur fajra kamp'.
Sed en la lumo de la mangrenad'
en blua ĉap' staris svedsoldat'.

En Youtube: <https://www.youtube.com/watch?v=SKlvo9mrHH8>



Multo estas dirita pri Esperanto.....

El diversaj gazetoj Inga prenis la jenan:

Kniivilä har en originell förmåga: Förutom ryska behärskar han det konstgjorda språket esperanto och har därför en del kontaktytor som hans kollegor i Moskva saknar. Fortfarande finns det en hel del esperantister runt om i världen.

För att ha någon glädje av sina språkkunskaper är de beroende av att prata med utlänningar och bildar sålunda en blygsam men vittförgrenad liten international utan maktambitioner.

Aftonbladet – Carsten Palmaer 2015

Språkkakafonin var enorm. Det var här **Ludwig Zamenhof**, uppväxt i Bialystoks ghetto skapade det söta och supermoderna språket esperanto – ett språk han trodde skulle överbrygga alla lingvistiska barriärer och förena hela världen.

Inspirationen till vansinnesprojektet var den fattigmans-esperanto han själv växte upp med – jiddisch.

Aftonbladet – Martin Aagård 2015

Kniivilä havas originalan kapablon: Krom la rusan, li regas la artefaritan lingvon Esperanto kaj tial havas iujn kontaktpunktojn, kiuj mankas al liaj kolegoj en Moskvo. Ankoraŭ troviĝas ne malmultaj esperantistoj ĉirkaŭe en la mondo.

Por ĝui siajn lingvaj kapablojn, ili dependas de parolado kun fremduloj kaj tiel formas modestan sed ampleksan etan internacion sen potenciaj ambicioj.

Aftonbladet – Carsten Palmaer 2015

La lingva kakofonio estis grandega. Ĉi tie Ludwig Zamenhof, kiu kreskis en la Bjalistoka geto, kreis la dolĉan kaj supermodernan lingvon Esperanto, ” lingvo, kiun li kredis, transpontos ĉiujn lingvajn barojn kaj kunigos la tutan mondon.

La inspiro por la freneza projekto estis la esperanto de malriĉuloj, kun kiu li mem kreskis – la jida.

Aftonbladet – Martin Aagård 2015

Hildegard von Bingen försökte knappast bilda något alternativ till latinet som religiöst ceremonispråk. Inte heller något nytt universellt idealspråk, i stil med esperanto.

OBS Sveriges radio – Magnus Florin nov. 2020.

Är det brister i det internationella språket som lett till att genomslaget uteblivit?

SvD – Mikael Parkvall 2017

Twitter 1 jan 2021

.... and the creator of esperanto is dead and esperanto is a living language so you can not change it.

Esperanto somewhat never took off: The League of Nations made attempts to promote teaching **Esperanto** in member countries, but the resolutions were defeated mainly by French delegates who did not feel there was a need for it!

What's the new main EU language now that we lost English?

Una nuova lingua tipo esperanto.

L'esperanto té una gramàtica que s'aprèn en cinc minuts.

Du sollst Esperanto lernen.

Ich wette es gibt mehr Leute die flüssig Klingonisch sprechen als **Esperanto**.

Koreanska:

우리 에스페란티스토들은 열심히 공부하고 사용하며 또 보급해야 합니다.

Esperanto via tempo venis!

Gratulon! Bonvenon al la sekreta mondo de Esperanto.

Hildegard von Bingen apenaŭ provis formi alternativon al la latina kiel religia ceremonia lingvo. Ankaŭ ne ekzistas nova universala ideala lingvo, laŭ la stilo de Esperanto.

OBS Sveda radio – Magnus Florin nov. 2020

Ĉu mankoj en la internacia lingvo kaŭzis mankon de efiko?

SvD – Mikael Parkvall 2017

Twitter 1 Jan 2021 angle:

.... kaj la kreinto de esperanto mortis kaj esperanto estas vivanta lingvo do vi ne povas ŝanĝi ĝin.

Esperanto iel neniam ekflugis: La Ligo de Nacioj klopodis antaŭenigi instruadon de **Esperanto** en membrolandoj, sed la rezolucioj estis venkitaj ĉefe de francaj delegitoj, kiuj ne sentis bezonon por ĝi!

Kio estas la nova ĉefa EU-lingvo nun, kiam ni perdis la anglan?

Itale: Nova lingvo kiel Esperanto.

Katalane: Esperanto havas gramatikon, kiun oni bezonas kvin minutojn por lerni.

Germane: Vi devus lerni Esperanton.

Mi vetas, ke estas pli multaj homoj, kiuj flue parolas klingon ol **Esperanton**.

Koree:


Ni, esperantistoj devas diligente studi, uzi kaj disvastigi Esperanton.

Esperanto via tempo venis!

Gratulon! Bonvenon al la sekreta mondo de Esperanto.

Korea alfabeto

el Vikipedio – trovita de Inga



Det koreanska alfabetet eller Hangul (koreanska 한글 hangeul, uttalas "hangul") används för att skriva det koreanska språket.

Det skapades på 1440-talet på rekommendation av kung Sejong.

Till skillnad från andra alfabet är de koreanska bokstäverna (koreanska: 자모jamo, uttalas "chamo") grupperade i stavelsebärande fyrkantiga celler. Jam-bokstäverna placeras i cellen uppifrån och ned och från vänster till höger i ordning av fonemen i stavelsen.

Läs vidare (på esperanto):

https://eo.wikipedia.org/wiki/Korea_alfabeto

Koreanska skrivtecken är de smartaste tecknen på den kontinenten. Kinesiska tecken är ju nästan oändliga och japanerna håller sig med tre alfabet.

Man skulle kunna säga att skapandet av ett alfabet 1440 motsvarar skapandet av ett språk 1887.

Mycket kan man säga om esperanto, men Zamenhof var klok nog att välja det latinska alfabetet, men ändå snegla på det kyrilliska och kanske även det hebreiska. Därför har vi ju de "övertecknade" bokstäverna.

Jag har idag sett en video från någon som tycker det alfabet, som engelsk-talare använder, är hopplöst och inkonsekvent.

Han önskade att de hade haft de regler som finns i esperanto.

En bokstav – ett ljud, därmed basta!

La korea alfabeto aŭ Hangulo (koree 한글 hangeul, elparolata kiel "hangul") estas uzata por skribi la korean lingvon. Ĝi estis kreita en la jaroj 1440 post rekomendo de la reĝo Seĝong.

Malsimile al aliaj alfabetoj, la koreaj literoj (koree: 자모jamo, elparolata kiel "ĉamo") kuniĝas en silabvaloraj kvadrataj ĉeloj. La jamo-literoj estas metitaj en la ĉelon de supre malsupren kaj de maldesktr dekstren laŭ la ordo de la fonemoj en la silabo.

Legu plu:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Korea_alfabeto

Koreaj skribsignoj estas la plej inteligentaj signoj en tiu kontinento. Ĉinaj literoj estas preskaŭ senfinaj, kaj la japana havas tri alfabetojn.

Oni povus diri, ke la kreo de alfabeto en 1440 egalas al la kreado de lingvo en 1887.

Multe eblas diri pri Esperanto, sed Zamenhof estis sufiĉe saĝa por elekti la latinan alfabeton, sed tamen rigardinte la cirilan kaj eble eĉ la hebrean.

Tial ni havas la "ĉapelitajn" leterojn.

Hodiaŭ mi vidis filmeton de iu, kiu pensas, ke la alfabeto, kiun uzas anglalingvanoj, estas senŝanca kaj malkonsekvenca.

Li deziris, ke ili havu la regulojn, kiuj ekzistas en Esperanto.

Unu litero – unu elparolo, jen sufiĉe!

/Inga

La gramatiko de lingvo sen gramatiko

E-libro de Renato Corsetti



Roberto Poort skribas pri la libro:

La Gramatiko de Lingvo Sen Gramatiko estas libere elŝutebla lernolibro de Renato Corsetti (2018) kiu skribis en la enkonduko:

Ĉi tiu ne estas lernolibro por komencantoj sed lernolibro por komencintoj, por homoj, kiuj jam lernis Esperanton, kaj volas relerni ĝin laŭ la reguloj de la Fundamento de Esperanto.

http://bonalingvo.net/index.php/La_gramatiko_de_lingvo_sen_gramatiko


Ingas språkspalt i januari

Jag har konstruerat ett hjälpmedel som är användbart när man ska komma ihåg alla alfabetets bokstäver och de grammatiska regler som finns i esperanto. Dessa informationer är uppdelade i 4 delar, till fyra nummer av tidningen.

Jag använder mig av origami och länken till "det skruvade alfabetet" ser ut så här:

https://www.youtube.com/watch?v=GTGCV_6EpLM
How To Make a Paper MAGIC CUBES

I denna beskrivning sätts 4 kuber tillsammans (de limmas ihop).



För vårt esperanto-alfabet behövs 7 kuber.

När dessa 7 kuber är fästade mot varandra uppstår 28 fria ytor. På dessa skriver man

a b c **ĉ** d e f
 g **ĝ** h **ĥ** i j **ĵ**
 k l m n o p r
 s **ŝ** t u **ŭ** v z

Om man har färgpennor kan man rödfärga de 5 vokalerna, grönfärga de sex övertecknade bokstäverna och resten av konsonanterna kan vara blå eller svarta.

Denna "alfabets-stav" kan sedan skruvas ihop enligt bilden från länken ovan. Då blir den platt och lätt att transportera till en lektion. När man skruvar upp den, tar man varje rad för sig och diskuterar om de 7 bokstäver som finns där.

Del 1

a-vorto

vorto kun la finaĵo montras ecojn, kvalitojn, apartenojn, rilatojn k.s.

a-vorto priskribas

ekz. bela, bongusta, verda

ekz. mia, via, lia, alia

aliaj vortoj kiuj finas per -a: kia, tia, ĉia, ia, nenia, kioma, ioma k.s.

as-finaĵo

as-verbo montras ke la ago, stato estas reala, efektiva; komenciĝis sed ne finiĝis.


La ago, stato okazas nun, okazas kutime, validas.

Kelkaj simplaj vortoj kiuj komenciĝas per a:

al aĵn

aĉo aĝo aĵo

ago amo ano aro avo



Mer origami för den intresserade: TRANSFORMING NINJA STAR: <https://www.youtube.com/watch?v=n01fsCDWAUc>
 Ringen har två sidor med 8 mindre ytor vardera. På dessa 16 bitar kan man få in de 16 reglerna.

bo- parenceco pro geedziĝo

bofamilianoj: bopatro, bopatrino, bofrato, bofratino k.s.

aliaj – bokuzo, bonevo, boonklo, bonepo k.s.

bebo – (laŭ Albino Ciccanti –

https://eo.wikipedia.org/wiki/Albino_Ciccanti)

bedaŭrinde bonŝance – vi elektu

aliaj - bojo bono boto bovo bubo bufo

ci – pronomo

cia, ciumi – parolante al iu, kiu uzas ci (ne vi)

tre malofte uzata – ekz. tre intime aŭ al tre

altranga (komparu la angla Thou)

aliaj – caro, celo, citi, colo

ĉi

en la loko, pli proksime (tempo, spaco)

ĉia ĉie ĉio ĉiu k.s.

ĉi tia, ĉi tie, ĉi tio, ĉi tiu k.s.

ĉar ĉe ĉu

aliaj – ĉapo, ĉaro, ĉelo, ĉeno

da de di- do du

aliaj – dato, dek, des, dis, domo, dono

e – finaĵo de adverbo

ek el en

eco eĥo ejo emo ero

eble

f –

fek!

fi!

for!

fabo, fero, fini, fojo, fuŝi

Detta var a-f. Nästa gång kommer g-ĝ.

/Inga

Por ni nova gazeto, nomita Nova Urbo

Socikultura bulteno de Fokolar-movado – Inga trovis ĝin.

La **Fokolar-Movado** (itale *Movimento dei focolari*) estas internacia katolika organizaĵo, kiu en 1943 fondiĝis fare de la tiutempe 23-jaraĝa italino Chiara Lubich en Trento kaj antaŭenigas la idealojn de unueco kaj universala frateco.

La Movado restas plejparte katolika, sed havas fortajn ligojn kun la ĉefaj kristanaj konfesioj kaj aliaj religioj, aŭ foje ankaŭ kun homoj kaj movadoj nereligiaj. Laŭ la stato de 2016, la movado tutmonde havas proksimume 140 000 oficialajn membrojn en 182 ŝtatoj, laŭ informoj de la movado proksimume du milionoj da homoj havas regulan kontakton al la movado aŭ subtenas unuopajn projektojn.

La itala nomo "focolare" signifas "hejmo" ("*focoli*" estis la fornoj de la historiaj kamparanaj domoj en la italaj montaraj vilaĝoj, kunvenejo kaj renkontejo de la familioj) aludu al la varma kaj protekta etoso de familio.

Ekzistas faka Esperanto-asocio de la nomo Esperanto-grupo en la Fokolar-Movado.

Inter 1961 kaj 1964 aperis Nova Civito, la esperantlingva eldono de la revuo Città Nuova de la Fokolar-movado. Ekde 1997 aperas Nova Urbo, "novaĵletero de la Fokolar-movado", hodiaŭ surreta bulteno kvaronjara. (el Vikipedio)

Jen letero al la legantoj:

Karaj Legantoj,

Unue ni bondeziras al vi, al viaj familioj kaj geamikoj Feliĉan Novjaron, sen virusoj kaj ĉiam kun bonaj novaĵoj. Post la virtuala E-kongreso, eble la venontjara povos okazi normale. Rilate al Olimpikaj Ludoj, la ĉefministro de Japanio anoncis ke tiu granda evento devas okazi kaj montri, ke la sporta mondo venkos virusojn por plue servi la mondpacon. Ĉu esperantistoj ankaŭ povas tion fari? Jes, reale kun siaj eblecoj. Jen kion mi aŭdis ĵus hodiaŭ:

"Se vi volas porti pacon al la mondo, iru hejmen kaj amu vian familion".

Amike, via NU red. – kun foto pri ĉevalsleda veturo en montara neĝo.



Plej malsupre en la sekva bildo: 9–13-jaraj bazlernantoj libertempas en ripozejo de Baffardière en la Alpa montaro de Francio. Ili membras en la Fokolara Movado.



'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

Tradukistoj kaj Esperanto



Por la ĉi-jara decembro estis planita 22-a Monda Kongreso de Tradukistoj, dum kiu oni devas uzi du oficialajn laborojn: anglaj kaj francaj. Aldone, por la gastiganta lando permesas estis ankaŭ la hispana. Tio signifas, ke praktike estus tie uzata nur unu el tiuj tri - la angla. Pro la virusa paniko, ankaŭ tiu kongreso estis prokraste nuligita, simile kiel plimulto de eventoj.

La tuta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>


Reveno al renkontiĝoj




Paĝo tri, el nur kvar paĝoj, enhavas artikolon pri sveda verkistino. Ĉu ŝia libro "Döstädning" estas tradukita en iun fremdan lingvon? Ĉu vere eksterlanda leganto volus organizi sian vivon svedmaniere? /Siv

Lastaj ordigoj (parto 1)

Aŭtune la bio-ritmoj (ritmoj de la naturo) malrapidas, folioj falas (en la norda hemisfero) kaj ĉio eniras malvarman vintran sezonon. Ankaŭ ni homoj havas siajn sezonojn: de la senpacienca printempa junaĝo ĝis pensiga, aŭtuna maljuneco.



Pri aŭtuna sezono de la vivo traktas ankaŭ libro de Margareta Magnusson en sia libro "Arto organizi la vivon sved-maniere". Ŝi dividas kun siaj legantoj praktikajn konsilojn kiel fari la t.n. **Döstädning** – t.e. apartigi ĉiujn havaĵojn antaŭ ol ni forlasos tiun ĉi mondon, sen ŝarĝi per tio niajn posteulojn, heredantojn aŭ la pli junajn familianojn.



Tiu problemo gravas aparte en la E-movado. Okazas tiel, ke niaj maljuniĝantaj samideanoj kolektis eble multajn E-librojn, fotojn aŭ dokumentojn, foje tre interesajn kaj unikajn. Kiam ilia sanstato ne plu ebligas prizorgi tion kaj la familio ne estas interesita pri Esperanto, do ili simple ĉion forĵetas. En tia situacio povas troviĝi eble kelkaj niaj legantoj aŭ iliaj konatoj. Kion fari kaj kiel savi nian kulturan heredaĵon?

La tuta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>



Ne serĉu la neniigon. Ĝi trovos vin. Serĉu la vojon kiu faros ĝin plenumita. *Dag Hammarskjöld.*



Medito pri tipa brito

Trovita en Facebook-paĝo de Roger Nilsson.

Jen ĝi en esperanto:

Unu el la britaj naciaj gazetoj demandis al siaj legantoj: – Kio signifas esti brito?

Kelkaj el la respondoj estis ŝercaj, sed la jena de sviso estas elstara:

Esti brito temas pri:

konduki **germanan** aŭton al **irlanda** trinkejo por trinki **belgan** bieron, poste iri hejmen

havante **hindan** karco-pladon aŭ **turkan** kebabon. Poste sidanta sur **sveda** meblo, spektante **usonajn** filmojn per **japana** televidilo.

Li aĉetas libertempon en **Hispanio**, skias en **Francio** – kaj havas **rumanan** gastfilinon.

Do, ni ĉiuj dependas de aĵoj el aliaj landoj. La mondo estas unueco – aŭ devus esti! /Siv

Kio estas tipe por la svedoj?

Kion Roger skribis pri tipa anglo, certe validas ankaŭ por svedo. Ni adoptis multajn eksterlandajn kutimojn, vortojn, manĝojn.

Svedoj amas la naturon kun la vastaj arbaroj. Arboj inspiras al la kreo de familiaj nomoj. En Anglio Taylor, Baker kaj Carpenter ja estas familiaj nomoj el metioj. Povus ankaŭ esti svedaj nomoj, sed tre malofte. En Svedio multaj nomoj spegulas la naturon. Ne ĉiuj estas logikaj. Bergkvist (monto + branĉeto) aŭ Sjögren (lago + branĉo) tute ne estas logikaj, sed oni ne pensas pri logiko lige al nomoj.

Blomkvist (floro + branĉeto), Alström (alno + torento), Björklund (betulo + arbareto) Ekbacke (kverko + deklivo) estas ekzemploj de "naturnomoj". Ofte ili origine aludas al la naturo de parenca bieno al kiu la posteuloj havas varmajn rilatojn.

Laŭ la radioprogramo "Språket" (la Lingvo) Danio kaj Norvegio ne same elektas "naturnomojn".

La naturromantiko estas grava trajto. Dan Andersson tradukas "la svedan animon" per poemoj kaj John Bauer per bildoj. Pri John

Bauer vi povis legi en la oktobra numero
2020. En ĉi tiu numero poemoj jam abundas,

sed unu el Dan Andersson devas havi lokon:

Al mia fratino (Till min syster) Teksto kaj muziko:

Dan Andersson. El la sveda tradukis Sten Johansson.

1) Nun herbojn en la marĉo jam karesas varma vent'
dum kantas mi pri ĝojo, kaj sinceras la gitar'.
Fabelo foren flugas el la ŝaŭmo de l' torent'
kaj helpas nian sanon per mirika dolĉa mar'.

2) Printempon mi alvokas per la kant' al vi, fratin'.
Erikojn en Luossa zume kisas la abel'.
Jen trinkas ni profunde da amara forta vin'
kaj paŝis infanaĝo inter tero kaj ĉiel'.

3) Sed venas la miraklo de printemp' en roza vest',
Eĉ kiam niajn vangojn jam paligis la sufer'.
Dum nokto timtremante kaj dum tago en majest'
jen trinku vi feliĉon el montaro kaj river'.

4) Do, venu sub paduso kaj salik' en ŝtorma hor'.
Printempĉielo brulas nun por steloj kaj por Di'.
Kaj kiam endormigis vin rezeda sonĝ-odor'
vin vokas kampaj rozoj, venu dormi inter ni!



<https://www.youtube.com/watch?v=F4P2J9vdf2c>

La svedoj de la 2021 – kiaj ili estas?

- Språkförsvaret plendas pri la multaj usonaj influoj: filmoj, kantoj, vortoj invadas nin. La lernejoj koncentriĝas pri la angla kaj ofte ĝi estas la sola fremda lingvo, kiun gelernantoj elektas.
- Svedoj regas Sociajn mediojn tre bone. La teknikon ili konas de junaĝo.
- Svedoj amas muzikon. Multaj muzikgrupoj estas famaj ne nur en Svedio.
- Kafo kun cinamaj bulkoj oftas. En la almanako la cinama bulko havas apartan memortagon.

Fakte ne estas ni svedoj kiuj devus karakterizi nin. Estas la vizitantoj el aliaj landoj.

Iam fremdulo diris: "En Svedio la fenestroj estas malkovritaj. Oni vidas kion la loĝantoj faras. Male, la pordoj bedaŭrinde estas fermitaj."

Ĉu svedoj ne estas gastemaj? Kompare kun kiu lando? Kion vi diras?

/Siv

Siv Widerberg 1931–2020

La verkistino, pedagogino kaj debatantino forpasis en sia tiujara naskiĝtago, raportis la sveda ĵurnalo DN.

Siv Westerberg havis la infanojn kaj ilian plej bonan en la fokuso.

Kun libroj kiel "La unua libro de infanoj", "La libro de malgrandaj infanoj" kaj la libro "Amo kaj ribelo", neniu povas diri ke Siv Widerberg ne traktis la infanan situacion grave dum la tuta vivo.

Ŝi skribis proksimume 60 librojn. Ŝi skribis pri infanoj kaj al infanoj, ŝi skribis pro sia infanamo.

Siv Widerberg ne timis skribi pri malagrablajoj kiel infanbrutalaĵoj kaj aliaj malagrablajoj.

Siv Widerberg atingis 89 jarojn kaj postlasis grandan malplenen.



Ĉiuj en la mondo havas respondecon por infanoj. Ne forgesu! /Ingegerd



La knabino, kiu ne volis iri al la infanejo. Origina sveda titolo: Flickan, som inte ville gå till dagis. Teksto: Siv Widerberg, 1986, trad. Malte Markheden; bildoj: Cecilia Torudd.

La libro estas mendebla ĉe la Esperanto Societo de Gotenburgo. Kostas 70 SEK + sendokosto. /Siv

El gazeto de Hennebont, Bretonio

Publié le 05 mai 2017

Esperanto. Deux Suédoises en visite.



Margareta Andersson et Siv Burell (debout) ont été reçues par les membres du club d'esperanto hennebontais.

Chaque année, le club d'esperanto hennebontais accueille des hôtes étrangers. Cette fois-ci, Margareta Andersson et Siv Burell, deux Suédoises de passage en France, bénéficient de l'hospitalité des esperantistes hennebontais. Arrivées en France il y a une semaine, elles ont visité le château de Gresillon, haut-lieu de l'esperantisme en Anjou, et Amboise. Elles ont passé deux jours à la découverte du sud du département: Lorient, Carnac, la côte atlantique... « Nous avons rencontré Margareta et Siv il y a deux ans, au congrès international de Lille, où elles nous avaient promis de venir nous voir en 2017. C'est chose faite », précise Yvette Veslin, la présidente de la section d'esperanto du Foyer laïque. Bretons et Suédoises se sont donné rendez-vous en 2018, pour le congrès international qui se tiendra à Lisbonne, auquel six esperantistes hennebontais ont déjà prévu de participer.

Översättning mha Google translate:

Publicerad 5 maj 2017

Esperanto. Två svenskor på besök.

Bildtexten: Margareta Andersson och Siv Burell (stående) togs emot av medlemmar i Esperanto Hennebontais-klubben.

Varje år välkomnar Esperanto Hennebontais-klubben utländska gäster. Den här gången åtnjuter Margareta Andersson och Siv Burell, två svenskar som passerar Frankrike, gästfriheten hos Hennebontais Esperantistes. Anlända till Frankrike för en vecka sedan besökte de Château de Gresillon, ett esperantismens mekka i Anjou och Amboise. De tillbringade två dagar på att upptäcka södra delen av landsändan: Lorient, Carnac, Atlantkusten ... "Vi träffade Margareta och Siv för två år sedan, vid den internationella kongressen i Lille, där de lovade att komma och se oss i 2017. Det är klart," säger Yvette Veslin, ordförande för esperantoavdelningen i Foyer laïque. Bretoner och svenskar träffades 2018 för att den internationella kongressen skulle hållas i Lissabon, där sex


Hennebontais-esperantister redan har planerat att delta.

Memoro de 2017, kiam Margareta kaj mi iris al Francio. Ni vizitis niajn geamikojn Annie kaj Alain, Parizo, Edith kaj Daniel, Amboise kaj dum kvin tagoj ni partoprenis kurson en Greziljono, organizita de Jannick Huet kaj Berto Schumann. Poste Yvette Veslin gastigis

nin en Hennebont proksime al Lorient en Bretonio kaj ni renkontis partoprenantojn de du esperantaj kursoj gviditaj de Yvette. Margareta partoprenis en la UK de Lille kaj tie konatiĝis kun Yvette. Erare estas skribite ke ankaŭ mi ĉeestis la UKn de Lille.

Ni vere amas Francion kaj la francajn esperantistojn!! /Siv

La baroka epoko de Ingegerd Granat



LA VORTO "BAROKO" signifas aŭ monstra aŭ neregulaĵo kaj la vorto ofte estis uzata en malestima senco. Ekz. Estas baroke (= absurde)!

"Skokloster" estas unu el la plej bone garditaj barokaj palacoj en la tuta Eŭropo kaj rakontas pri altnobleca vivo dum la grandpotenca tempo en Svedio.

La palaco estis zorgeme renovigita dum la pasintaj jaroj kaj hodiaŭ la sveda ŝtato posedas la palacon "Skokloster". Dum printempo, somero, aŭtuno kaj ankaŭ se vi havos interkonsenton, troviĝos gvidanto en la palaco.

Do, prenu la ŝancon! Vizitu "Skokloster" kiam eblas! Vidu la ŝarĝan barokan stilon kie larĝaj ŝtuparoj, drastaj koloroj kaj teksitaj tapetoj gvidas nin en la barokan epokon. Pompaj



oleaj pentraĵoj pendas ĉe la muro montrantaj militajn personojn kaj kolonoj el blanka skulpturita marmoro renkontas nin en la vestiblo kiel ankaŭ bustoj kiuj staras laŭ la muro reprezentantaj romiajn imperiestrojn.

”Atmosfera” de baroka stilo videblas en pezaj mebloj, malnovaj libroj, dekoraciaj detaloj kaj oldaj armiloj.

Do, kial ne vidi per viaj propraj okuloj? Skokloster ne situas longe for de Sigtuna en Uplando.

La muzika baroka periodo okazis dum la jaroj 1600–1760 kaj tiutempe ni trovis komponistojn kiel:

Claudio Monteverdi
Dietrich Buxtehude
Henry Purcell
Tomaso Albinoni
Johann Sebastian Bach
Georg Friedrich Händel
Johan Helmich Roman (svedo)
inter aliaj komponistoj de la tempo.

Ĉu mi rajtas rekomendi ”La vintro” de Antonio Vivaldi?

La baroka galerio



La peza, granda kaj malhela ŝranko de baroko staras kun la kaŝitaj sekretoj ĉe la muro en la salono de kiam la palaco estis konstruita kaj longa tempo pasis post tiu okazo.



Granda kaj peza manĝotablo staras en la centro de la ĉambro. Seĝoj kun altaj kaj rektaj dorsapogiloj staras ĉirkaŭ la tablo.

Rekte kontraŭ la granda ŝranko staras ore kolorita meblo kun tre alta spegulo. Se oni rigardas sin en la spegulo estas eble vidi ankaŭ la grandan ŝrankon.

La manĝoĉambro estas aranĝita por festa tagmanĝo. Oni regalos nin per kapreolo kiu estis pafita en la ĉasejo ĉirkaŭ la palaco.

Nun atendas la aranĝita tablo la belajn homojn el la baroka tempo.

Kiam ili venos la vino fluos kaj la danco komenciĝos!



La belaj homoj.



Versailles por la danco.

/Ingegerd

Se vi volus sperti nekutime pensantan konatulon – elektu Gry Jannicke Jarlum



Jannicke havis 19 jarojn, kiam ŝi subite fariĝis fama roka kantistino en Norvegio. Sed jam ekde la 13a jaraĝo ŝi komponis, ludis kaj kantis.

Som musiker är Gry Jannicke Jarlum mest känd hemma i Norge för singeln "Svake mennesker" från 1981 som låg på landets förstaplats i 16 veckor. Denna låt finns även med på svenska som "Svaga Människa" på svenskspråkiga utgåvan av hennes debutalbum från 1981.

Dum 16 semajnoj unu el ŝiaj kantoj – Malfortaj homoj” -- troviĝis en la unua loko sur la ”kanzonlisto”.

”**Vi estas mi**” estas ŝia unua libro, bedaŭrinde ankoraŭ nur en la norvega kaj sveda.

En 1993 Jannicke havis fortan sperton de nifo (svede: UFO). Poste ŝi komunikis kun estaĵoj sur aliaj ”niveletoj”. Ŝi demandas kaj ricevas respondojn.

Jannicke diras ke estaĵoj de aliaj mondoj sendas mesaĝojn al la homaro per ŝi. La libro temas pri la celo de la vivo. Ŝi diras ke ni devas havi respondecon por eviti katastrofon. La eksteranoj ekzistas kaj havas multe pli altan evoluon, intelekto kaj anime ol ni. Jannicke prenis sur sin transdoni iliajn mesaĝojn pri universala amo kaj paco.



Ekzemploj pri titoloj de la ĉapitroj:

Aŭskultu vian enan voĉon
Nur la sensciaj detruas
Ni kreas niajn meman veron
Malsano
La forto de la penso
Ni devas agi nun!
La vira kaj la virina rekuniĝas
Milito sur la tero

Reinkarniĝo
Nia rilato al la bestoj
La tempo de aflikto estas for

Tre facile legebla libro kun mallongaj ĉapitroj kun forta kredo ke vere gravas niaj pensoj kaj agoj. Ni neniam devas kulpigi aliajn pro niaj vivkondiĉoj. Ni mem kreis ilin. /Siv

Kristina Lugn

1948–2020, estis sveda poeto kaj dramatiso, membro de la Sveda Akademio. Ŝia poezio estis parte inspirita de la poezio de Sonja Åkesson kaj estas ia rolulpoezio kun ŝajnaj sinkonfeso kaj bizara humuro. Centraj temoj en ŝia poezio kaj dramato estas la morto, la soleco, timo pri la mezaj vivjaroj kaj sufoka, sed ĉiam aspirata normaleco. (El Vikipedio.)



La apartamento devas havi akcepteblan nivelon
la kato devas komenci ronroni
tuj kiam mi venas en la ĉambron
la pantofloj devas plaĉi al mi
kaj la kaĝo devas plaĉi al la leporo
avino devas ricevi zorgan bastonadon nun
kaj la gumarbeto devas esti duŝita
iu devas provi alvoki

la atenton de la policisto
kaj la kuirejo devas esti riparita antaŭ la noktfino
la leteroj devas havi adresaton
kaj la preĝejoĥoroj devas esti ŝmiritaj
la klozetoj devas esti akvumitaj
kaj ĉio devas esti farita en bona ordo
tuj kiam mi venas en la ĉambron

El "Bekantskap önskas med äldre bildad herre" de 1983. Trad. Andreas Nordström.

Iomete pri Adrienne Pásztor, Hungario

Inter esperantistoj Adrienne Pásztor nomas sin Adri. Ŝi estas 77-jara verkistino de Miskolc en norda Hungario, kaj skribas kaj hungare kaj esperante.

Ŝia nova projekto temas pri kolektado de rakontoj el multaj landoj, prefere rakontoj, kiuj montras la tipajn trajtojn de la aktuala lando.

Eble vi havas ideon pri rakonto, tipa por Svedio? Ni povas peri ĝin al Adri.

Mi ricevis kelkajn de Adri verkitajn tekstojn, ekz.

"Tutmondaj defioj de la klimatoŝanĝiĝo". Ĝi partoprenis en Belarta konkurso de UEA kaj ricevis premion.

Tamen ni en la redakcio decidis ne publikigi ĝin, ĉar ĝi estas sufiĉe longa kaj havas teknikajn terminojn kiuj estas plejparte tro sciencaj por la plejparto de niaj legantoj. Sed se iu volas ĝin ni peros la kontakton. Mi trovis ĝin tre interesa – sed iomete malfacile legata. /Siv



De maldekstre: gasto de Pollando, Adrienne kaj Lászlóné Pásztor (Adri kaj Laslo) en vinkela restoracio.



Jen la gesinjoroj estas en la kalvinana gimnazio Lévy. Tie troviĝas memortabulo pri D-ro Ludoviko Györy Nagy kaj D-ro Kolomano Kalocsay.


El la biblioteko en Stannum – Volapük

La unua Volapük-kongreso okazis en aŭgusto 1884 en Friedrichshafen, Germanio. Ĉi-sube maldekstre Volapük-diplomo de Schleyer el la 80-aj jaroj kaj dekstre la Volapük-himno kaj germane kaj volapüke. La himno troviĝas surbendigita (1984?) en nia esperanto-biblioteko en Stannum.

En la jubilea libreto okaze de la centjara datreveno de la unua Volapük-kongreso la verkisto Reinhard Haupenthal skribas en la Antaŭparolo:

Nuntempe Esperanto iĝas ĉiam pli sinonima de planlingvo: unuflanke forpeliĝis ĝiaj konkurantoj (Ido, Occidental kaj Interlingua fariĝis sensignifaj) kaj aliflanke ŝajnas ke

finiĝis la krea fazo de interlingvistiko. Similan sinonimecon havis antaŭ unu jarcento la ŝlejera (la kreinto nomiĝas Jul. Schleyer) Volapük. Pli ol Esperanto ekde 1900, Volapük sukcesis furori post pokaj jaroj: ĝi elmetiĝis al ĝenerala mokado kaj al la venkocerto de rapide kreskanta grupo de adeptoj, apogantoj kaj propagandistoj mem, kaj lia anaro rigardis Volapukon kiel frukton de epoko kredanta je progreso kaj scienco. Fakte, oni apenaŭ kontestis la bezonon de mondlingvo pro la tutmonda komerco kaj la ekspansio de poŝto kaj fervojo. En la daŭro de kelkaj jaroj Volapuko disvastiĝis el la striktaj limoj de sia sud-germana patrujo al tuta germanlingvujo.




Jen kelkaj linioj el *Kortfattad Volapük-grammatik* (tradukite):

La vokaloj estas ĉiam longaj, la akcento en la lasta silabo.

Nominativo: fat = patro; la patro fats = patroj.

Genitivo: fata = de patro, de la patro; fatus = de patroj, de la patroj.



Dativo: fate = al patro, al la patro; fates = al patroj, al la patroj.

Akuzativo: fati = patron, la patron; fatias = patrojn, la patrojn.


Vokativo: o fat! = ho, patro!
o fats! = ho, patroj!

La Volapük-himno de Franz Zorell en Esperanta traduko

Kultivi pacon kaj fratecon
kaj konkordon – jen devizo!
Jubilu al la verko!
"Unu lingvo!" krii vi kun ni!
"Validu por la tuta tero!
Jen la cel' de la Ligo!"

Proklamu: kio do multigos
La prosperon de l'homaro?
Unu lingvo savon ja instruos.
Kiam sonos ĝi de poluso al poluso.
Tial sciu l' universo:
"Unu lingvo por la tuta mond'!"

Vivu do la lingvo,
kaj la sprita inventinto! –
Kaj la subtenantoj de l' afero.
Kriu vaste tra la maro kaj la tero!
"Estu unu lingvo, unu buŝo
Sur la tuta tera rond'."



Pixabay

Gekuzoj renkontiĝas en Gotenburgo

de Siv Burell

Genealogia serĉado estis la nova hobia de Sara Berggren. Post kelkaj semajnoj ŝi faris interesan eltrovon. Ŝi havas nekonatan kuzon, loĝantan en Londono, Peter Taylor, nun 31-jara. Neniam antaŭe Sara aŭdis pri li. Nek ŝiaj gepatroj nek la parencoj iam parolis pri li. Ŝajne estis familia sekreto.

Kiam Sara demandis al siaj gepatroj pri iu Peter Taylor, ili ŝajnis same nesciantaj kiel ŝi mem. Onklo de Sara iam iris al Britio, sed post tempo transloĝis al Usono kaj restis tie. Povus esti lia filo. Li foje vizitis Svedion kun

sia edzino kaj du filinoj. Ĉu li ankaŭ havas filon, filon kiu ne nomiĝas Berggren? Kia surprizo!

Sara skribis al Peter, kaj ricevis respondon. Li rakontis ke li estas adoptita kaj ne sciis pri sia patro. Lia patrino mortis kiam li estis nur infaneto kaj post periodo en infana azilo li venis al Betty kaj John Taylor, paro sen propraj infanoj. Lia infanaĝo estis feliĉa. Li studis kaj nun laboras en elektronika entrepreno.

Sara atendis ĉe la flughaveno. Peter estus alta, svelta kaj brunhara, laŭ la foto, kiun li sendis al ŝi. Hodiaŭ li portus grandan, verdan koltukon kiel identigan markon. La aviadilo venis ĝustatempe kaj la torento de homoj venis en la grandan halon. Baldaŭ ŝi ekvidis lin kaj mansignis kaj li rekte iris al ŝi. Brakumo aŭ manpremo – post tempeto ŝi elektis brakumon.

Post kelkaj salutvortoj kaj babilo pri la flugveturo ili iris al la aŭto, kiun Sara pruntis de siaj gepatroj, kiuj posedis du Volvo-aŭtojn, ĉar ambaŭ ja laboras ĉe Volvo Torslanda.

La programo estos la jena: Peter tranoktos ĉe la gepatroj de Sara. Ŝia propra apartamento en la centro estas eta kaj ofte mankis parkejo. Ĉar la gepatroj laboros ĝis la kvara Sara prenis sur sin la taskon gvidi Peter en la urbo.

Survoje de la flughaveno Landvetter al Gotenburgo ili haltis en Nääs, sinjorlando, kiu estis unu el la turistaj celoj en la ĉirkaŭaĵo de Gotenburgo. Ankoraŭ la somermezstango kun florkronoj ŝajnis sufiĉe novfarita. Antaŭ du semajnoj miloj da vizitantoj dancis ĉirkaŭ ĝi – kune kun dancistoj en folkloraj vestoj. Meznokte estis danco kun brulantaj torĉoj.

– Ĉu en via lando estas la tradicio de somermezo pluki naŭ specojn de floroj kaj meti sub la kusenon? Sara demandis. Dum la nokto oni sonĝos pri sia venonta edzo. Nu mi pensas ke nur la knabinoj plukas florojn, ne la knaboj.

– Mi neniam aŭdis tion. Mia patrino diris ke se oni manĝus tre salan patkukon, oni sonĝus ke la venonta edzino venos kun glaso da akvo.

Ho, jam ili iomete konis unu la alian, Sara pensis, kiam ili iris de la sinjorlando al la kafejo kaj la turistvendejo. Ili sidiĝis ekstere kaj trinkis "svedan kafon" kun cinamobulkoj. Sara tre ŝatas Nääs kaj volis rakonti ĉion – pri Selma Lagerlöf kaj Nils Holgersson ekzemple,

sed ŝi ne volis lacigi sian gaston per tro multe da detaloj. Tamen li ŝajnis esti interesata, kaj ŝi daŭrigis.

Ŝi rakontis pri la slojdseminario trans la laĝeto, kiu iam logis gelernantojn el la tuta mondo. Hinda skribis libron pri siaj travivaĵoj en Svedio kaj en Nääs. I.a. li rakontis pri la helaj noktoj en Nääs. Je meznokto li foje iris por manĝi, kredante ke estas mateno.

Sara jam sentis sin bone kun la novtrovita kuzo. Ŝi nur denove cerbumis ĉu ŝi parolis tro. En Svedio oni ne estas tiel parolema kiel en la kontinento, sed ŝi verŝajne ne estis tipa svedino. Sed li ŝajne trovis la kunestadon agrabla.



Pixabay

– Kio estas tipa por la sveda karaktero? li demandis.

– Fakte estas malfacile por mi diri tion. Niaj kutimoj nun ŝajnas svedaj, eĉ se ili devenas de aliaj landoj. ... Estas eksterlandanoj, kiuj diras kio estas karakteriza. Multaj el niaj vortoj venas el la latina, la germana, la franca kaj nun grandskale la angla. La statuso de la angla estas alta kaj usonaj filmoj abundas. Multaj firmaoj havas la anglan kiel laborlingvon kaj en la universitatoj la literaturo ofte estas angla.

– Ĉu svedoj hontas pro sia gepatra lingvo?

– Ne hontas, sed se oni volas havi kontakton kun la plejparto de la mondo oni devas paroli angle. Ankoraŭ neniu planita lingvo, kiel Esperanto, sufiĉe disvastiĝis, malgraŭ ke estus pli facile havi neŭtralan mondlingvon sen gramatikaj malfacilaĵoj.

Ili daŭrigis la vojaĝon kaj la interparolo silentis. Peter turnis sian kapon jen dekstren, jen maldekstren.

– Por mi la regulo konduki sur la dekstra flanko povus kaŭzi problemon. Kiel piediranto mi turnas la kapon en la malĝustan direkton.

– Morgaŭ vi pensos ke tio estas la plej bona regulo.

– Mi dubas. Sed via kondukstilo estas bonega.

Ili preterpasis Korsvågen, kaj Sara montris la amuzparkon Liseberg, kaj Universeum.

– Morgaŭ ni povas iri al Universeum. Tie troviĝas diversaj medioj. Oni komencas la vagadon de la supro en la sameaj pejzaĝoj kun malvarmaj riveretoj kun naĝantaj fiŝoj kaj subenirante la temperaturo pli kaj pli altas. La pluvarbaro estas interesa kun multkoloraj flugantaj birdoj.

– Svenska Mässan – kio estas tio?

– Diversaj foiroj alternas. Ni ofte partoprenas en la Libro Foiro kun stando de esperantaj libroj.

– Sed Sara, mi ankaŭ volus scii, kion vi scias pri Londono.

– Bedaŭrinde ne multe. Mi estis nur okjara kiam mi estis tie kune kun miaj gepatroj. Mi memoras La Planetaron kaj London Dungeon. La lasta timigis min. Estis la krimoj de la pasinteco. En Speakers Corner en Hyde Park mi staris sur renversita bierkesto parolante per forta voĉo al miaj gepatroj. Venis du – tri aliaj personoj, kaj ili aplaudis. Sed ili ne sciis pri kio mi parolis en la sveda.

– Do, vi certe devas iri al Londono denove! Iam mi havis somerlaboron kiel gvidanto, kaj krom la multaj indikoj pri jaroj, mi ankoraŭ

memoras la grandan iradon kun multaj turistoj.

La suno iomete ĝenis la kondukadon de Sara. Tamen ŝi nepre volis montri la panoramon de Ramberget (la korva monto).

– Nun ni iros al Ramberget en la norda parto de Gotenburgo. Ĉi tiu ponto estas novkonstruaĵo. La malnova – tie – havas 81 jarojn.

La panoramo de Ramberget estis nekutime klara.

– Morgaŭ ni piediros tra la urbo. Tiam miaj gepatroj ne laboras. Ili vere ĝojas renkonti vin.

Kaj tiele estis. Survoje de la laboro ili aĉetis manĝon kaj la kvarteto manĝis en la vilao de la familio Berggren. La patro montris fotojn de sia frato Jan, kiu sendube estas la patro de Peter.

– La sama nazo, la sama fronto kaj hararo, kiu rezistas la brosadon aŭ kombadon por mem elekti hararanĝon.

Peter ridis.

– Peter, ĉu vi volus kontakton kun Jan, la patro demandis.

– Tute ne, fariĝis la respondo. Mi estas kontenta pri mia nuna vivo, kaj eble lia edzino ne scias pri mi. Sed mi volonte daŭrigos la kontakton kun vi, mia nova familio! Koran dankon pro via gastemo, Peter diris.

Post la tritaga sperto pri la vivo en Svedio, aŭ almenaŭ pri la vivo de Gotenburga familio, Peter revenis al Londono kun planoj pri nova renkonto.

Kompreneble Gotenburgo plaĉas al li. La urbo estas ja nomata "Eta Londono".

/Siv

Pri vikingoj en Nordio

La vikingoj estis marmilitistoj, marrabistoj, esplorvojaĝistoj kaj koloniistoj kiuj partoprenis en rabiradoj kaj militiroj en Eŭropo kaj Okcidenta Azio ekde 793 ĝis la 12a jarcento. (Kial Vikipedio povas esti tiel ekzakta? mi demandas min. Ĉu iu scias kio okazis en 793?) Vikingoj eltrovis Vinlandon (Nordamerikon) kaj koloniis Islandon kaj grandajn partojn de la Britaj Insuloj kaj la nuna Rusio. La vikingoj ankaŭ faris komercojn.

La vikingoj inspiris al libroverkado. "Orm la Ruĝa" troviĝas kiel E-libro kaj nun parto de "Arne la ĉefido" troviĝas kiel sonartikolo. Por komencintoj kaj daŭrigantoj la libro estas inspira kursmaterialo. Ĝi estas aĉetebla ĉe Esperantoförlaget

www.esperanto-gbg.org/eldona/

eldona@esperantosverige.se /Siv



Arne la ĉefido (parto)

de Leif Nordenstorm

Tegmentometado estis unu el la laboroj, kiun liberuloj kaj sklavoj povas fari kune. Kiam urĝas, multaj devas helpi. Kiam beroj estas rikoltendaj, kiam la viando de buĉitaj bestoj estas portenda al la vilaĝo kaj kiam la greno estas rikoltenda, tiam liberuloj kaj sklavoj laboras kune. Ĉiuj laboroj, kiuj rilatas al armiloj – ĉasado, milito kaj laboroj kun hakilo aŭ tranĉilo – ĉio tia estis rezervita por la liberuloj. La monotonaj kaj pezaj taskoj – tiri la plugilon, kiam la ĉevaloj ne sufiĉas, melki, fosi sterkon, tiri hakitajn arbojn al la vilaĝo – tio estis la laboro de la sklavoj.

Estis vilaĝoj, kie la disdivido inter sklavo kaj liberulo estis eĉ pli rigora. Tie liberuloj kaj sklavoj apenaŭ povis fari ion ajn kune, eĉ malpli tolereble estis ke la liberaj infanoj ludus kun la sklavidoj. Tie ĉi en la vilaĝo la diferenco ne estis same granda. Eble tio dependis de tio, ke lia patro Björn, kiu estis ĉefo de la vilaĝo, edziĝis al Gudrun, filino de

Danoj surbordiĝas en Anglio en la jaro 866 (el "Miscellany on the life of St Edmond" de la 1130-jardeko – el Vikipedio.)

liberigita sklavino. La avino de Arne sekve estis sklavo, kiam ŝi estis infano. Kiam ŝi fariĝis juna virino, Torsten, la avo de Arne, tiel enamiĝis en la sklavjunulinon kun la brunaj okuloj, ke li neniam sukcesis ĉesi pensi pri tio, ke ŝi fariĝos lia edzino. La patro kaj la patrino de Torsten unue rifuzis permesi al sia filo edziĝi al sklavino. Kiam pasis jaroj kaj la filo ne volis interesiĝi pri aliaj virinoj, ili ne eltrovis alian rimedon ol cedi. Torsten edziĝis al la sklavjunulino, sed ŝi devis ŝanĝi sian nomon. Ŝi nomiĝis Siv, kaj tiel ricevis nomon de libera virino. La alian nomon, kiu estis fremda kaj nekomprenebla, oni neniam plu rajtis mencii, kaj ankaŭ Arne neniam aŭdis ĝin. Verdire ne estis la intenco, ke li – la ĉefido – scius, ke lia avino estis simpla

sklavino. Rakontis la veron Gunnar. Li aŭdis tion de sia patrino, kaj li rakontis al Arne.

– Ĉu vi venas nur nun, Arne, plej lasta el ĉiuj? diris Rolf, la patro de Gunnar.

Ĉiuj ridis.

– Jes, mi venas la lasta, diris Arne. Mi devis bone dormi post la festeno. Ĝi daŭris ĝis malfrue, aŭ kion opinias vi?

Ĉiuj ridis denove. Arne ne indigniĝis, kiam Rolf ŝercis. Rolf fakte estis majstro pri ŝercado. Kiam Arne estis malgranda, li facile malĝojiĝis pro tiuj ŝercoj, sed kiam li maljuniĝis, li komprenis, ke la plej bona maniero eviti esti incitita, estas nur daŭrigi la interparolon, kvazaŭ nenio okazis.

– Ĉu mi povas helpi pri io? daŭrigis Arne.

– Mi dubas, diris Rolf.

Mi kredas, ke ni estas sufiĉe multaj tie ĉi. La fojno baldaŭ elĉerpiĝos, kaj la tegmento baldaŭ estos preta. Vi povos iri al Grandmonto por informiĝi, ĉu la alkido, kiu sin forsavis hieraŭ, estas tie. Ĝi eble ĉirkaŭvagas. Ni certe bezonos ankoraŭ idon. Fumaĵita alkviando estos uzebla, kiam alvenos la vintro. Laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton.

– Certe, diris Arne, mi iros.

Arne iris al la paŝtejo. Li ĉirkaŭrigardis por vidi, ĉu Trumbe estas proksime. Li ne estis ĉe la tegmentometado. Kie li nun povas esti? Se patrino Gudrun ekscius, kiel ili malbontraktis Trumbe, Arne kaj Ylva estos riproĉitaj. Patrino volis, ke la sklavoj ne estu

malbontraktitaj. Pri patro estis malsame. Li neniam intervenus, eĉ se la ludoj iam fariĝus krudaj. La sklavoj iel elturniĝu, tiel kutime diris patro.

Ĉu Trumbe ie kaŝiĝis apud Ogrolago? Arne komencis kureti. Estis multe da ŝtonegoj kaj blokoj proksime al la kaptofoso. Inter la blokoj estis multe da kaŝejoj. Eble estus pli bone kontroli, ĉu Trumbe estas tie. Oni certe ne timu pri li. Li certe elturniĝos, sed se li ne revenos al la vilaĝo vespere, patro maltrankviliĝos, ke li fuĝis, kaj tiam certe iu el la knabinoj elbabilos tion, kio okazis, kaj tiam oni ne scias, kio okazos. Sklavo estas pli

multekosta ol bovino, kaj patro ne estos kompatema, se Trumbe estos for. Prefere bone serĉi lin.

Tie estis la plej granda bloko, kiun oni nomis gigantoĵeto. La gemaljunuloj rakontis, ke giganto iam ĵetis la ŝtonegon al homa

vilaĝo. Unu flanko estis tiel kruta, ke ne estis eble grimpi supren tie, sed la alia flanko estis deklivo kaj Arne pene povis grimpi ĝin. Plej supre sur la bloko staris Arne. Li streĉis sin kaj klopodis plilongigi sin kiel eble plej multe. Li ĉirkaŭrigardis. Trumbe ne estis ĉe la lanca arbostumpo li ne estis videbla sur Grandmonto kaj ankaŭ ne malsupre ĉe Ogrolago. Arne turniĝis al la margolfeto.

La bloko ne estis plej bona loko por bone vidi la maron. Pli bone eble estus iri al la golfeto. Trumbe certe staros tie ĵetante ŝtonojn en la akvon. Kiam li nur ploris ĝisfine, ne estos malfacile igi lin reiri kune al la vilaĝo.



El islanda Edda

Nesaĝa vir', veninta societen, prefere estu silenta;
neniu scias, ke li nenion scias, nur se ne parolas li tro.

Vintra bildo de mia kuireja fenestro



Kiam mi venas kun mia fotilo, la birdoj jam forflugis. Tial mi prenas bildon de Pixabay pri rubekolo.

Ĝuu la vintron!

/Siv

